



**13a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO
CALELLA (BARCELONO) HISPANIO, 1an - 8an de oktobro 2005
(SUB LA AŬSPICIOJ DE HISPANA ESPERANTO-MUZEO)**

Koresponda adreso.

Luis Serrano Pérez ,Apartat 423, ES-08200 Sabadell (Barcelono) Hispanio. Tel. (34) 93 72750 21. Faksilo .(34) 93 731 10 31 (Ne dum aŭgusto). Rete

luis-serrano@mixmail.com. Nia <http://www.terra.es/personal5/lherrano> 2003

Kiel ni jam anoncis,s-ro Stano Marček redaktoro de la revuo ESPERANTO prelegos pri : "100 jaroj de la revuo ESPERANTO", kaj laŭ lia sugesto oni preparos ekspozicion pri la revuo .

ATENTU! Ĉiuj aliĝintoj ricevos senpage ekzempleron de la verko "Don Kiĥoto".



La 22a Printempa Staĝo de CBE en Agde ,Francio estis tre sukcesa. Ĉeestis 40 geesperantistoj kaj oni organizis kvar E-kursojn.S-ro S.Aragaj kun sia edzino, gvidis kiel la pasintajn jarojn la superan E-Kurson. Partoprenis 10 gelernantoj.



Barcelono organizis la 6an Ferion de la Kulturaj Asocioj (Fireentitats)la tagon 20an-22an de majo.Partoprenis pli da 130 Asocioj, inter ili Barcelona Esperanto-Centro s-ro Joan Clos urbestro de Barcelono vizitis nian standon, tralegis la verkon PIV kaj interparolis kun la BEC-estraro. La ferio estis vizitata de 10.000 personoj.

BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

Bassegoda, 40, 3^o, 1^a

Telefono 93 333 80 81

ES-08028 BARCELONA (Hispanio)

A T O M O

Junulara Sekcio de B E - C

Ap. 23484



La 57a IFE-Kongreso en Brasov, Rumanio estis tre interesa kaj altnivela. Partoprenis pli da 270 gekongresanoj el 22 landoj. Salutis nome de Hispanio s-ro Martín Guerrero, en la foto je la unua vico li kaj lia edzino.

KANTU KUN NI

“La sireno”

-Havankanzono de Joan Rosquellas-

Nokte mi renkontis lin
 en kavo, fuma trinkejo.
 Li estis fola marist', ,
 dronante, per vin', suferojn.
 Inter kanzonoj kaj vin',
 elŝprucis la histori': „,
 la virin' de li amata,
 la maro forportis ŝin' .

“Mi ĵuras ke vidis ŝin'
 transformita en sireno,
 kaj dum noktoj, en tempest',
 al strand' portas min, serena.
 Ŝian voĉon aŭdas mi
 dum tagoj de maro kalma;
 de la rifoj, kompleksar',
 por konsoli min, ŝi kantas.”

Ĵus la sun' al okcident',
 en haven', boat' alvenas
 la tre ne juna marist',
 la amatinon serĉante.
 Ĉiutage, vere, li, , „,
 fuĝi ne povas, de l' mar';
 nepre, la virin' amata
 jam li ne forgesos ŝin!

Reripetu la tutan strofon “ Mi ĵuras ke vidis ŝin “, dumdu fojoj, kaj jam finita la lasta aldonu: “ Mi ĵuras ke vidis ŝin transformita en sireno! Tradukadapto el la kataluna lingvo de Ricard S. Güell. B-29-11-2004

ESPERANTO POR ENKONDUKI PLI HUMANAN CIVILIZACION

Antaŭ ne multe pli ol kvar jaroj, oni celebris la alvenon de la dudekunua jarcento. Tiam regis optimismo pri la estonteco. En la disvolviĝantaj landoj la vivnivelo kreskis kaj kun ĝi la aŭtomobiloj kaj vilaoj, kiel dua hejmo. Ankaŭ kreskis la divoĉemo pro libereco sen respondeco, konsumado de drogoj, ktp. Tamen kvankam kreskis la scio pri scienco kaj tekniko, pri sociaj aferoj preskaŭ estis ĝenerala indiferenteco.

Antaŭ tia socia stato, multaj reakciis ne rigardante la estontecon, sed revante pri idealigita pasinteco pli virta kun tradicioj kaj kutimoj de etna deveno. La menso de multaj homoj revis pri pasinta historio kaj feliĉaj cirkonstancoj, kiuj neniam ekzistis.

Sed nun, post malmulte da tempo, tia optimismo malaperas. La internaciaj institucioj por garantii la pacon ne efikas. La Eŭropa Unio malfacile unuiĝas kaj ne prosperas efika unueco, ĝi restas ankoraŭ kiel unika merkato, sed sub la faka hegemonio de Germanio kaj Francio. La Eŭropa Unio vere estas asocio de ŝtatoj, sed ne asocio de civitanoj. Ŝajnas, ke pro la lingvaj baroj devas rapide disvastigi la lingvon Esperanto, pro ĝia facileco kaj neŭtraleco pri naciismoj, sed ne tiel okazas, plie ĉiu nacio, nacioto kaj eĉ etnaj senŝtataj nacioj, sopiras por oficialigi kaj internaciigi sian lingvon. Komprenible la potencaj ŝtatoj pro nacionalismo volas konservi sian hegemonian povon kaj kontraŭas kian ajn lingvan proponon.

Pro la procezo mem de la komunikiloj, la mondo fakte reduktiĝas kaj la industriiĝo fariĝas ĝenerala. La laboristoj de Ĉinio, Hindio kaj orientaj eŭropaj ŝtatoj, kiuj ankoraŭ ne troviĝas en konsumema socio, estas preta por labori per malaltaj salajroj sen preskaŭ sociala asekuro. En tiuj landoj, precipe Ĉinio, kreskas la propra industrio kaj la internacia kapitalo investas tien, konkurante la merkatojn vendante pli malmultekoste. Estas vera minaco, ke la vivnivelo de la konsumemaj socioj disfalu kaj kresku la sendungeco. Alie, la prospero mem de Ĉinio kaj de aliaj landoj baldaŭ povos atingi la statuton de granda potenco kaj minaci la aktualan hegemonion de Usono. Usono jam militas por kontroli la naftajn fontojn kaj impone rearmiĝas. Ĝi timas la ĉinan potecon, kiu post kelkaj jaroj povas superi la usonan. Ĉinio rearmiĝas, aliaj nacioj ankaŭ. Ĝenerala rearmiĝo oni kondukas sin al milito. Nova tutmonda milito ruinigos la homaron kaj eĉ povas malaparigi ĝin sur la tersurfaco. Tio estas krizo de civilizacio.

Estas necese ŝanĝi mondscale la nunan mensan sintenon de la homoj. Se ekonomie jam regas la internacia kapitalo, ankaŭ la menso de la homoj devas mondscale ampleksiĝi. La problemoj de la nuna tutmondiĝo estas nur solveblaj per monda interkompreniĝo kaj kooperado. Oni devas forgesi la limigitajn nacionalismojn. Oni devas superi la fundamentalismojn naciajn, religiajn kaj eĉ la ideojn. Estas necesa reciproka komprenemo kaj kooperado, ĉar neniu povas vivi izole, kaj kolektive ni ankoraŭ restas alfronte disigitaj. Jam alvenis la tempo de la esperantismo unuigita al aktualigita homaranismo por ŝanĝi la ĝeneralan mensinklinon cele al nova pli humana civilizacio.

Giordano Moya

OPINIOJ

La drogoj. La malbena "paradizo".

Apetita perturbo, ulceroj, sendormeco, laceco, takikardio, cerba atrofio, tremoj, konvulsioj, koleremo, angoro, apatio, difektiĝo de interpersonaj rilatoj, forigo de memestimo, deprimado, kulpsento, vidaj kaj aŭdaj halucinoj, malkresko de la intelekto, psika kaj fizika dependenco, ... se ne paroli pri la problemoj kiujn kaŭzas la drogoj al la familianoj de la drogumuloj. Kaj ĉio ĉi, kontraŭ kio? Simple kontraŭ nenio. Do, kial oni konsumas drogojn?

Tute sendube, la kuriozo sperti novajn sentojn, la deziro elturniĝi el la realo kaj el siaj problemoj, la premo de la amikaroj, kaj la facila atingado de drogoj, estas kelkaj el la ĉefaj kialoj kiuj faras ke, socio pli kaj pli disrevigita, konkura kaj stresa, fine falas en la reton de tiu malhela kaj tenebra vojo al la morto.

Nur adekvata informado kaj edukado povas bremsi tiun teruran tutmondan epidemion, kiu nuntempe afektas nian socion. Ĉu ni kapablos?

Santiago Sanz



REUNIÓ ■ Els membres de l'entitat es reuneixen al local de l'estació per practicar l'esperanto i preparar activitats

L'ENTITAT ■ ASSOCIACIÓ ESPANYOLA FERROVIÀRIA D'ESPERANTO

Impulsant la llengua universal

■ DAVID FORNIÉS

Els esperantistes (és a dir, aquelles persones que parlen l'esperanto o estan interessades en aquest idioma concebut per a esdevenir una llengua auxiliar universal) tenen, a l'estació de la Renfe del Clot, un dels seus punts de referència: la Hispana Esperanta Fervojista Asocio (o, el que és el mateix, l'Associació Espanyola Ferroviària d'Esperanto), entitat que organitza activitats, sempre amb un denominador comú: l'idioma ideat a finals del XIX per Ludwig Zamenhof.

L'entitat agrupa empleats i exempleats de la companyia de trens espanyola, tot i que també té membres que no tenen relació amb el món del ferrocarril però que s'interessen per l'esperanto, com és el cas de Martí Guerrero, vicepresident de l'associació,

que explica els avantatges de l'idioma: "És neutral, senzill i ha donat proves que funciona".

Per a Guerrero, "una de les coses més gratificants de l'esperanto és poder estar amb gent de 19 o 20 llengües diferents i relacionar-te amb elles amb facilitat, sense aparells traductors". A més, l'avantatge és, segons Guerrero, que l'ús de l'esperanto no dóna avantatge a ningú, en ser un idioma que no pertany a cap país: "És com l'euro, que no era prèviament la moneda de cap dels estats de la Unió Europea".

L'Associació Ferroviària d'Esperanto publica el butlletí *Libera Trako* (Via Lliure), ofereix cursos d'esperanto dos dies a la setmana i organitza una excursió cada mes, a algun lloc de Catalunya. En una d'aquestes sortides, l'entitat va lliurar un exemplar del Quixot en esperanto a la biblioteca del castell de Peralada,

que ja disposava de 33 versions de l'obra de Cervantes i ara ja té la de l'idioma universal.

Tot i que ja fa més de 100 anys que l'esperanto va ser creat, i que l'idioma no ha assolit —encara— l'èxit que Zamenhof esperava, Guerrero s'ho mira d'una altra forma: "Es tracta d'una llengua jove. Les guerres mundials li van fer molt de mal. També hi ha interessos econòmics que juguen en contra. Però tot i això, s'està estenent. L'associació universal, per exemple, agrupa delegats de 120 països".

FITXA

Adreça: Estació de Renfe del Clot
Aragó cantonada Meridiana
Apartat de correus 15027 -
08080 Barcelona
Telèfon: 93 261 07 71

4-aj SOMERAJ DIALOGOJ, Esperanto - Restadejo de BEC, Monistrol de Montserrat Barcelono, Hispanio, 10-an, kaj 11an de septembro. Adreso. Cami del Pou 9 M de M Informoj. tel. 64 54 04 755. Tri dialogoj atendas vin. Partoprenu!! Ni akceptos kore vin.